

Vol. 13—18 de Scienca Revuo

estas haveblaj laŭ la malplialtigita prezo:

por la membroj de ISAE 15 steloj, por aliaj 20 steloj

La antaŭajn volumojn de la revuo ni bedaŭrinde ne povas liveri, pro la nekomprenemo de la antaŭa eldonisto.

Vol. 19 estas havebla laŭ la normala abonprezo

(25 steloj por la membroj de ISAE, 30 steloj por aliaj)

Ne forgesu ke ankaŭ SCIENCAJ STUDIOJ estas ankoraŭ haveblaj

(laŭ la malnova prezo de nur 50 steloj)

La pagojn faru plej bone pere de la delegita reto de ISAE.

Bonvolu noti ke  
la nova, konstanta, adreso  
de la sekretario de ISAE  
kaj de SCIENCA REVUO  
estas

Prof. Bož. Popović. Ognjena Price 80, BEOGRAD, Jugoslavio

# SCIENCA REVUO

UDK 001 (05) = 408.92

Vol. 20

N-ro 3/4 (79/80)

10. 11. 1969.

Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 2,2 us. dol. = 25 din

## El la enhavo:

- E. Sonnenfeld: La difina artikolo en la strukturo de Esperanto
- A. Albault: Deksi! Liv! Deksi! Liv!
- D. L. Armand: Duflanka problemo de mondaj vivrimedoj
- C. Stop-Bowitz: Birdetoj kiel ekstermantoj de insektoj
- A. Heck: Apsida moviĝo kaj stelstrukturo
- Filčakov, Sukennyk, Matvijišyn: Pri solvo de... ekstrema problemo...
- M. Kossakowski: Evoluo de nord-okcidenta reto de brazilaj ŝoseoj
- D. B. Gregor: Atlantis- pluaj teorioj
- Indeksoj de volumoj 11—20 de Scienca Revuo
- ISAE-TC-134: El la fakoj

## NOVA VIVPERIODO DE SCIENCA REVUO

Per ĉi tiu (duobla) numero finiĝas la dua volumdeko de Scienca Revuo, unika tia periodaĵo en la mondo.

Pli frue ol Scienca Revuo, en Esperanto aperadis kelkaj sciencaj periodaĵoj, el kiuj la plej menciindaj estas: Internacia Scienca Revuo (aperis jam ek de 1904, 8 grandformataj volumoj kun multe pli ol 4000 paĝoj) kaj Bulteno de la Internacia Scienca Asocio Esperantista ekde la jaro 1926. ĝis la Dua mondmilito). ISAE mem estas fondita en 1906. en Genevo, restarigita en 1922. kaj denove en 1947.

SCIENCA REVUO aperadas, pli-malpli regule, ekde la jaro 1949. Post unujara paŭzo en 1961., ĝian aperigadon transprenis (de la antaŭa, privata, eldonisto J. Muusses el Nederlando) la Internacia Scienca Asocio Esperantista mem. Redaktata kaj presata en Jugoslavio, ĝi maturiĝis sufiĉe por transiri ekde la Vol. 21 (la jaro 1970.) al 6 numeroj jare po 32 paĝoj minimume.

Pro ĉio tio la jarkunveno de ISAE en Helsinki decidis, kun la aprobo de la membraro, plioftigi kaj pliampleksigi la eldonadon de la Scienca Revuo. La sekvo de la decido estas:

Post la Novjaro 1970.:

6 numeroj jare po 32 paĝoj minimume

abonprezo (devige kun la kotizo al ISAE) 50 steloj jare

(La abonprezon en diversaj valutoj Vi trovos sur la lasta kovrilpaĝo). Ni esperas ke Vi trovas tiun decidon prudenta kaj ke Vi ne nur restos fidela abonanto, sed Vi varbos, ankaŭ novajn abonantojn.